

# LIA VIZAĜO BRILIS KIEL SUNO

Komento al la evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El la evangelio laŭ Mateo 17, 1-9

En tiu tempo Jesuo prenis kun si Petron, Jakobon kaj Johanon, fraton de Jakobo, kaj kondukis ilin sur altan monton aparte. Tie antaŭ ili Li transfiguriĝis: lia vizaĝo brilis kiel suno, kaj liaj vestoj fariĝis blankaj kiel lumo. Poste aperis al ili Moseo kaj Elija, kiu parolis kun Li. Tiam Petro diris al Jesuo: „Sinjoro, estas bone por ni esti ĉi tie. Se Vi volas, mi pretigos ĉi tie tri tendojn: unu por Vi, unu por Moseo kaj unu por Elija.” Dum li ankoraŭ parolis, jen luma nuboj kovris ilin, kaj el la nuboj aŭdiĝis voĉo diranta: „Ĉi tiu estas mia amata Filo, kiu plaĉas al Mi; aŭskultu Lin!” Aŭdante tion, la disĉiploj pro granda timo falis sur sian vizaĝon. Sed Jesuo alproksimiĝis, ektuŝis ilin kaj diris: „Leviĝu, ne timu!” Ili levante siajn okulojn neniu vidis, krom Jesuo sola.

Kaj dum ili malsupreniris de sur la monto, Jesuo ordonis al ili: „Rakontu al neniu la vizion, ĝis la Filo de la homo releviĝos el la mortintoj.”

En la evangelio de Mateo estas kvar montoj, unu en rilato kun alia. Al la monto de la feliĉproklamoj respondas la monto de la releviĝo, tio signifas, ke praktikante la mesaĝon de Jesuo, oni spertas Kriston releviĝintan kaj la nedetruiblajn vivon; al la monto de la tentoj respondas la monto de la transfiguriĝo. La dian kondiĉon, laŭ la evangeliisto, oni akiras ne per la adoro de la povo, sed per la fordonado de si mem. Ĉi tion la evangeliisto esprimas ĉe la 17-a ĉapitro de sia evangelio. Ni legu.

La evangelia peco ne komenciĝas, kiel en la liturgia teksto, per la vortoj “En tiu tempo”, sed per la vortoj “*Post ses tagoj*”, la datado estas altvalora, estas grava: la sesa tago, en la biblia tradicio, estas la tago de la kreo de la homo, kaj ĝi estas ankaŭ la tago en kiu Dio, la Sinjoro, sur Sinajo manifestis sian gloron. En Jesuo manifestiĝas la gloro de Dio, en la pleneco de lia kreado. “*Jesuo prenis kun si*”, tri disĉiplojn, la plej malfacilajn, tiujn, kiujn poste li havos kiel kunulojn, ankaŭ en la momento de sia pasiono. La unua, Simono, estas prezentita per lia malpozitiva kromnomo, Petro, kiu signifas “la

obstinulo", "Petron, Jakobon kaj Johanon, fraton de Jakobo, kaj kondukis ilin aparte", jen altvalora indiko, kiun donas al ni la evangeliisto: ĉiufoje kiam Mateo utiligas la esprimon "aparte", tion li faras por indiki nekomprenon aŭ kontraŭecon, malspritecon rilate Jesuon kaj lian instruon, do ni jam scias kiel la afero finiĝos, "sur altan monton", jen ĉi tiu monto estas la respondo al la altega monto, sur kiun la diablo portis Jesuon, proponante al li ĉiujn regnojn de la mondo, kondiĉe ke Li adoru la povon, tio estas: la dian kondiĉon oni akiras tra la povo. Jesuo ne samopinias, Jesuo montras al sia tentanto - kaj ni memorigas ke Petro, en ĉi tiu evangelio, ricevis de Jesuo la atributon "satano, tentanta diablo" - ke la dian kondiĉon oni ne akiras pere de la povo, sed pere de la ama fordonado de si mem.

"Li transfiguriĝis", laŭvorte havis metamorfozon, "antaŭ ili", la evangeliisto montras, kia estas la kondiĉo de la homo kiu pasas tra la morto. Petro, en la antaŭa peco, ribelis kontraŭ Jesuo, ĉar li ne akceptis la ideon de mortonta mesio. Nu, Jesuo montras al ili, ke la morto ne estas fino, sed pleneco de vivo, la morto ne detruas, sed potencigas la personon. "lia vizaĝo brilis kiel suno", la suno estas la bildo de la pleneco de la dia kondiĉo, "kaj liaj vestoj fariĝis blankaj kiel lumo.", ĝi estas la bildo de la dia kondiĉo, samkiel kiam Jesuo diros ke la justuloj brilegos kiel suno en la regno de la Patro, kaj tiuj blankegaj vestoj estas tiuj de la releviĝo. Do Jesuo montras ke, pasante tra la morto, lia figuro ne nur ne estis detruita, sed eĉ ĝi estis plipotencigita.

"Poste aperis al ili Moseo", Moseo estas la granda leĝdoninto, "kaj Elija,", Elija estas la granda profeto, kiu, pere de perforto, altrudis la observon de la dia leĝo, "kiuj parolis kun Li.", estas grava ĉi tiu precizigo. Elija kaj Moseo, nome, tio kion ni nomas la malnova testamento, la leĝo kaj la profetoj, havas nenion por diri al la komunumo de Jesuo, ili interparolas kun Jesuo; samkiel ili estis la personoj kiuj interparolis kun Dio, nun ili interparolas kun Jesuo.

"Tiam", kaj jen la surprizo, "Petro", prezentita per la nura malpozitiva kromnomo, "diris al Jesuo: «Sinjoro, estas bone por ni esti ĉi tie. Se Vi volas, mi pretigos ĉi tie tri tendojn:», estas grava tio, kion Petro intencas fari. Unu plian fojon en ĉi tiu evangelio, Petro daŭrigas agadi kiel satano, kiel tentanta diablo de Jesuo, kaj kiu estas la tento? La mesio, laŭ la tradicio, aperos subite, dum la plej grava festo en Israelo. Inter la grandaj festoj de Israelo, unu estis nomata simple la festo, oni ne bezonis indiki ĝin laŭnome. Ĝi estis la festo en eminenta senco, la festo de la laŭboj: inter septembro kaj oktobro, dum unu semajno, la judoj vivadis sub laŭboj, kvazaŭ sub tendoj, memore pri la liberigo el la egipta sklaveco. Dum ĉi tiu festo, kiu memorigis la liberigon, aperos la nova liberiganto.

«mi pretigos ĉi tie tri tendojn: unu por Vi, unu por Moseo kaj unu por Elija», je la mezo, laŭ Petro, ne estas Jesuo. Kiam estas tri personoj, la plej grava estas ĉiam en la mezo. Laŭ Petro ne Jesuo, sed Moseo, estas la plej grava persono. Kian tenton faras Petro al Jesuo? Jen la mesio, kiun mi volas: mesio kiu observu la leĝon de Moseo, kun la profeteca kaj perfortema fervoro de profeto Elija.

"*Dum li ankoraŭ parolis,*", laŭŝajne Dio ne samopinias kun tio, kion diras Petro, "*jen luma nuboj*", iu bildo kiu, en la libro Eliro, indikas la liberigan ĉeeston de Dio, "*kovris ilin, kaj el la nuboj aŭdiĝis voĉo diranta:*", nature ĝi estas la voĉo de Dio, "*Ĉi tiu estas mia Filo*", filo ne estu komprenata nur la naskito, sed tiu, kiu similas la patron en la sinteno, "*amata*", tio estas la heredonto de ĉio, "*kiu plaĉas al Mi;*", la samaj vortoj kiujn Dio eldiris pri Jesuo, ĉe la momento de la bapto, kaj poste verbo en imperativa formo: "*aŭskultu Lin*". Vi devas aŭskulti nek Moseon nek Elija, sed en Jesuo estas la pleneco de la dia volo, de la dia revelacio, lin oni aŭskultu.

"*Aŭdante tion, la disĉiploj*", ĉi tiu dia interveno estigas konsternon kaj ĉagrenon, ĉar ĝi estas signo de malvenko, "*Aŭdante tion, la disĉiploj falis sur sian vizaĝon*", temas pri bildo kiu indikas la senton pri malvenko, pri pereoj, "*pro granda timo*", kial? La mesio, kiun ili sekvadas en Jesuo, ne estas tiu, kiun ili esperis, la venkanta mesio, la mesio kiu altrudos la leĝon, la mesio perfortema, sed iu tute malsama, kaj do estas malvenko de iliaj ambiciaj revoj, de la deziroj pri superregado. "*Sed Jesuo alproksimiĝis, ektuŝis ilin*", Jesuo devas tuŝi ilin precize kiel li tuŝas la malsanulojn, kiel li tuŝas la mortintojn, "*kaj diris: «Leviĝu, ne timu!»*". Sed la reago de la disĉiploj estas unu plian fojon malpozitiva: "*Ili levante siajn okulojn nenion vidis,*", ili ankoraŭ serĉas la referencajn punktojn de la tradicio de la pasinteco, ili ankoraŭ serĉas Moseon, la leĝon kiu havigas sekurecon, ili ankoraŭ serĉas Elijan, la profeton kiu, observigas ĉi tiun leĝon, sed estas plu neniu. Estas nek Moseo nek Elija, kaj, preskaŭ malentuziasme, la evangeliisto skribas: "*nenion vidis, krom Jesuo sola*". Jesuo sola al ili ne sufiĉas, ili volas Jesuon laŭ la maniero de Moseo kaj Elija.

"*Kaj dum ili malsupreniris de sur la monto, Jesuo ordonis al ili:*", do Jesuo superregas, "*«Rakontu al neniu la viziojn, ĝis la Filo de la homo releviĝos el la mortintoj.»*". Ili spertis, kia estas la kondiĉo de la homo kiu pasas tra la morto, sed ili ne havigu al si iluziojn, ili devas ankoraŭ vidi, kiaspecan morton Jesuo alfrontos, la morton kiun la Biblio rezervigis al la malbenitoj de Dio, abomenindan morton, la morton per la kruco. Do, por eviti maloportunajn sentojn de entuziasmo, diru nenion al iu ajn, ĝis post la releviĝo, nome, pli frue mi devos pasi tra la morto, kaj ĉi-speca morto.